Rainer Maria Rilke,

# Aŭtuno

*tradukita de Cezar*

Folioj falas iel el la for',
jen kvazaŭ velkus en ĉiel' ĝardenoj.
Faladas ili kun neanta gesto.
Kaj nokte sinkas peza ter' sen resto
el ĉiuj steloj al solec' en hor'.

Ni ĉiuj falas. Jen ĉi man' dum fal'.
Aliajn vidu, samas ja ĉe ĉiu.
Kaj tamen estas iu, tenas tiu
tenere ĉion softe dum la fal'.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de* RAINER MARIA RILKE *(Rajnero Mario Rilko, ∗1875-12-04 – †1926-12-29) en Esperanton de* CEZAR *(civila nomo: Hans-Georg Kaiser, ∗1954-05-21).*

*Arg-773-2256 (2015-01-22 12:16:31)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* `http://www.ipernity.com/blog/cezar/605953`.

Rainer Maria Rilke,

# Aŭtuno

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Folioj kvazaŭ el la malproksim'
- ĉu velkas enĉiele jen ĝardenoj? -
faladas kun gestad' neanta;
la peza Tero estas subiĝanta
en la solecon el stelar-senlim'.

Ne estas en la mondo viv' sen fin'.
Ja falas ĉiu mano. Tamen sciu,
ke regas super ĉio Iu, kiu
en Sia man' mildege tenas nin.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de* RAINER MARIA RILKE *(Rajnero Mario Rilko, ∗1875-12-04 – †1926-12-29) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1996-09-26.*

*MR-287-1 / Arg-773-1550 (2014-11-06 13:16:30)*